

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 9-an de junio 2022 per Zoom

Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Lars Sandbakk, Marianne Lund kaj Vidar Skretting.

1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 19-an de aprilo 2022

La protokolo de la pasinta kunveno jam aprobiĝis rete. Neniu komento.

3. Trarigardo de la protokolo de la landa kunveno la 4-an kaj 5-an de majo

Ni konstatis, kiel la decidoj de la landa kunveno devas influi nian agadon. La protokolo aperu en la tuj eldonota numero de Norvega Esperantisto.

4. Pritakso de la landa kongreso

La estraro taksas, ke la kunveno estis efika. La diskuto estis sincera, sed malfacila, kaj speguligis diversajn opiniojn. Bone, ke ni ekis la gravan diskuton pri la estonteco. La formato bone funkciis, la unua vespero estis bona preparo al la dua. Bona kontribuo de Espen Stranger-Johannessen. Teknike la reta kunveno funkciis bone.

5. La eldonado de Norvega Esperantisto

Estas malcerte, ĝis kiam Douglas pretos redakti NE kaj ĉu li redaktos ĝin en 2023. La estraro diskutis eblajn solvojn, inter kiuj estas revua kunlaboro kun aliaj nordiaj landoj kaj redukto de la nombro de jaraj numeroj. Ni ankaŭ diskutis la solvon, ke kelkaj aktivuloj de NEL dum transira periodo redaktu la revuon laŭvice aŭ kune.

La estraro opinias, ke parto de la enhavo de Esperanto-nytt devus aperi ankaŭ en la retpaĝo, por ke la retpaĝo estu pli aktuala.

6. Esperantonia

Kiel ni plulaboru laŭ la decidoj, faritaj en la landa kunveno? Tio ĉi estu la ĉefa diskutajo dum la venonta estrarkunveno.

7. Vortaro – ĝisdatigo pri la stato

Jardar havis kontakton kun Jørgen Bosoni. Necesas esplori, kiom el la farita laboro estas en la datumbazo. Jardar diskutos la demandojn kun la klubo de Trondheim kaj kun la redakcio kaj proponos solvon al la estraro.

8. Skandinava kongreso kaj – kunlaboro

Bård raportis de la kongreso.

Estis 35 partoprenantoj: 20 danoj, 12 svedoj kaj 3 norvegoj. La aranĝo estis 100% turisma, ĉar la planitaj landaj kunvenoj ne okazis. Orlando Raola prelegis pri sia laboro en UEA, Otto Prytz pri blinduloj en la movado kaj Gunnar Farm pri daŭripoveco. En la kultura vespero estis bonaj muzikistoj kaj komuna dancado kun Martin Strid. Kvankam la ŝipo estas konvena kunvenejo por tia kongreso, venis propono venontfoje kunveni en Gotenburgo.

9. Eventualajoj

Membroregistro – Lars faros ĝis la venona kunveno koncizan raporton pri eblaj solvoj kaj rekomendos unu el ili.

10. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 18-an de aŭgusto (eble ŝanĝota) je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund